



Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Majo : 4 2022

PROKRASTO DE EKZAMENO AKCEPTITA PRO RELIGIAJ KREDOJ

La Supera Tribunalo de la Valencia regiono en Hispanio ĵus permesis la okazigon de ekzameno al kandidato, dum malsimila horo al la ceteraj aspirantoj, pro ŝia religiaj kredoj.

Antaŭ kelkaj semajnoj, la Sandepartemento de la Valencia registaro kunvokis la aspirantojn al posteno de kuracisto en hospitalo. Kandidatoj devos trapasi ekzamenon la venontan sabaton 28-an de majo. Unu el la aspirantoj, sekvanto de la Septaga Adventisma Eklezio, atentigis pri la fakto, ke la ekzameno okazos dum sabato. La realigo de ekzameno dum ĉi tiu semajn-tago staras kontraŭ ŝiaj religiaj kredoj.

Do, la kandidato prezentis pledon antaŭ jura instanco, pro la fakto, ke se la ekzameno okazas dum sabato, ŝi devos elekti inter siaj religiaj kredoj kaj la eblo atingi taŭgan laborlokon. Krome, ŝi menciis la akordon subskribitan de la Hispana registaro kaj la Federacio de Evangeliaj Eklezioj, laŭ kiu, se kelka aspiranto al la okupo de publika posteno estas



sekvanto de unu el tiuj religiaj kredoj kaj la ekzameno okazas dum ne-taŭga tago, akorde al tiuj religiaj kredoj, oni povos proponi alian tagon.

Fine, la tribunalo akceptis la proponon okazigi la ekzamenon dum tiu sabato mem, tamen post la subsuniro, momento kiu ne estas taksata kiel “sabata tago”. Pro la fakto, ke la ceteraj kandidatoj devos ekzameniĝi je la 12-a horo tagmeze, la aspiranto, sekvanto de la Adventisma Eklezio, devos resti tute izolita kaj sen komunikiloj ekde la 12-a horo ĝis la subsuniro de la venonta 28-a de majo. Tiel al ĉiuj kandidatoj oni proponos saman ekzamenon.

Vorto de la Semajno

Artikolo: Ĉiu el la apartaj sekcioj, je kiuj estas dividita leĝo, traktato, statuto, ktp. Ofte, ĝi estas reprezentanta en juraj tekstoj de la signo §.

Sinonimoj: *paragrafo, rubriko, sekcio.*



Simbolo reprezentanta artikolon aŭ paragrafon. Blukolora ĝi estas la simbolo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio.

Pri la signo §

Ĉiu el la sekcioj de ĉapitro en jura teksto estas ordinare montritaj de la signo §. Kun tiu signifo ĝi estas uzata depost la 13-a jarcento. Pri la konkreta signifo de ĉi tiu simbolo, verŝajne ĝi reprezentas la kunigon de du literoj S, el la latina “signum sectionis” (signo de sekcio). Ĝi estas ofte uzata en centr-eŭropaj ŝtatoj por reprezenti justicon aŭ policon. Ekzemple, ĝi estas la simbolo de la Ministerio pri Justico de Aŭstrio kaj de la Krim-polica departemento de Pollando.

